BEKkurso PEPAS

dennis keefe, www.bekkurso.info

5-D Integrighaj Ekzercoj por 5-A, 5-B, kaj 5-C

Parolekzerco I 5-A (> 10 frazoj) -- pozitivaj frazoj

Pekino estas en Chinio. Pekino estas urbo, kaj Chinio estas lando. Pekino estas la chefurbo de Chinio. Londono estas en Anglio. Londono estas urbo. Anglio estas lando. Londono estas la chefurbo de Anglio. KTP

Parolekzerco II 5-B (> 15 frazoj) pozitivaj kaj negativaj frazoj

Tokio ne estas en Koreio. Ghi estas en Japanio. Tokio ne estas lando. Ghi estas urbo. Ghi ne estas la chefurbo de Chinio. Ghi estas la chefurbo de Japanio. Japanio ne estas en Euhropo. Ghi estas en Azio. Madrido . . . KTP

Parolekzerco III 5-C (> 20 frazoj) pozitivaj kaj negativaj frazoj

Mi nomighas ----------. Mi estas lernanto. Mi ne estas lernanto de la japana lingvo. Mi estas lernanto de Esperanto. Li (shi) nomighas ----------. Li (shi) ne estas instruisto de la franca lingvo. Shi estas instruisto de Esperanto. Shi . . . . KTP

Diktajho I

Kio estas Londono, kaj kio estas Anglio? Londono estas urbo, kaj Anglio estas lando.

Diktajho II

Kiu vi estas, kaj kio vi estas? Mi estas Pablo, kaj mi estas lernanto de Esperanto.

Diktajho III

Chu vi estas lernanto de la franca lingvo, auh chu vi estas en kurso de Esperanto? Mi estas lernanto de Esperanto.

KRM II (komparu kun KRMI, 3-D)

Starighu. Levu la manon. Sidighu. Levu la piedon. Mallevu la piedon. Prenu la libron. Levu la libron. Tushu la tablon (seghon, paperon, libron, skribilon). KTP

Skribotasko

Skribu pri Azio, auh pri Euhropo (10 – 20 frazoj)